

Kaŝitaj trezoroj de KELI en Ercmontaro

„Kaŝitaj Trezoroj“ logis 60 KELLanojn el 11 landoj de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto al Ercmontaro. La ĉijara kongrestemo de la Kristana Esperantista Ligo Internacia rilatis al la iamaj vivkondiĉoj en la montaro apud la ĉeĥa landlimo, kiam la plejmulto laboris en minejoj serĉante ercojn.

Wolfram Rohloff, luterana pastro en Zöblitz, havis la ideon okazigi la KELI-kongreson en sia paroĥo, nome en la kristana klerigejo Hüttstattmühle, kiu fakte montriĝis ege taŭga loko. La partoprenantoj ĝuis la situon meze en arbaro, la bonan manĝaĵon, la varian kaj interesan programon kaj ĉefe la revidon kun konatoj kaj geamikoj.

La strikta tagordo antaŭvidis ĉiutage matenan preĝon antaŭ la matenmanĝo, kantadon de la 9a ĝis 9:45 horo, prelegojn de la 10a ĝis tagmeze, poste paŭzon ĝis la 15a horo kaj denove du aŭ tri prelegojn ĝis la

vespermanĝo. La prelegoj, ofertataj de partoprenantoj, kovris vastan laŭteman kampon: kaŝitaj trezoroj, kristanaj fontoj, gramatikaj pingloj, Hieronimo de Prago, la religia situacio en Estonio, la Hajdelberga kateĥismo, la apokrifa evangelio de Maria Magdalena, perloj kaj porkoj kaj kaŝitaj trezoroj en la biblio, la diferenco inter lingvo kaj pensado, pilgrimanto sur Jakobaj vojoj ktp. La prelegantoj reprezentis jes diversajn pensmanierojn sed ne provokis akrajn diskutojn aŭ penajn provojn konvinki la aliajn de la propra opinio. Oni povis elteni, ke la aliaj restas grandparte ĉe siaj opinioj.

Laŭ kongresa tradicio la programo ankaŭ enhavis du ekskursojn: la tuttaga gvidis al Seiffen, kie oni produktas lignajn ludilojn, kaj al Neuhausen, fama pro la nuksorompila muzeo, la duontaga ekskurso estis migrado tra la malvasta valo de la Nigra Pockaŭ. Tie Wolfram klarigis la sistemon de kanaletoj, kiuj transportis la akvon al la minejoj.

Kompreneble ne mankis vespera programo. Elstaris la orgenkoncerto de Ernst Leuze (eklezia muzikdirektoro) kaj Elisabeth Rohloff (sopranistino); ŝi kantis la psalmon 137 en Esperanto. La kongresanoj ege ĝuis ankaŭ la vesperon kun ercmontara muzikgrupo kaj la skeĉojn, kiujn prezentis partoprenantoj la lastan vesperon.

Por mia edzo kaj mi estis la unua KELI-kongreso, en kiu ni partoprenis. Niaj antaŭaj dubetoj, ĉu ne estas tro longa tempo kongresi tutan semajnon, montriĝis senbazaj. Estis vere ripoziga kaj samtempe instiga semajno por ni.

Sed plej gravis la sperto de vivanta ekumeno: ĉeestis anoj de diversaj Evangeliaj Eklezioj, ĉeestis kelkaj katolikoj, kaj ĉeestis ortodoksaj kristanoj. Kulmino de la ekumena malferma diservo por ni estis la Sankta Manĝo, en kiu ĉiuj partoprenis.

Resume mi ŝatus diri, ke la amikeca etoso inter homoj el diversaj landoj kaj de diversaj konfesioj estas – ne kaŝita – sed videbla trezoro.

Hedwig Fischer

**Pieda ekskurso
dum la KELI-kongreso
Foto: Hedwig Fischer**

